# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 54, Numero 07-08, Julio - Aŭgusto 2019*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov**


## Jarkunveno

La Jarkunveno de EFNSK okazos dimanĉon la 1an de septembro je la 11-a matene.
La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Ĉiuj kandidatoj, inkluzive de tiuj, kiuj jam estas estraranoj, devas esti kandidatigataj kaj subtenataj. La kandidatoj devas ankaŭ konsenti, per retpoŝto, ke li aŭ ŝi akceptos la postenon. La sendanton de la unua kandidatigo oni konsideros kiel la proponanton, la duan kiel la subtenanton. Ambaŭ devas esti financaj membroj de EFNSK.

Laŭ la nova statuto de la Federacio (legebla ĉe http://esperantohouse.org.au/eo/about-us/), se iu estis estrarano seninterrompe dum naŭ jaroj aŭ pli, speciala rezolucio devas okazi, por permesi lin aŭ ŝin esti kandidatigata (kaj elektota) dum pluaj periodoj. Tial, ni voĉdonos pri la jena rezolucio (en la angla) dum la jarkunveno:
• That Nicole Else and Dmitry Lushnikov be permitted to be re-elected as directors.

Membro povas esti kandidatigata por unu aŭ pli el la jenaj postenoj:
- prezidanto
- vicprezidanto
- ĝenerala estrarano

Sendu kandidatigojn rete al: nsw@esperanto.org.au
Aŭ poŝte al:
EFNSK, Esperanto House
143 Lawson St., Redfern NSW 2016

Kandidatigoj devas esti ricevitaj antaŭ la 31a de aŭgusto 2019

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon, kaj bonvolu sciigi nin, ĉu vi deziras esti kandidatigata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion.
Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.

Amike,
Nicole Else
Sekretario, EFNSK

## Maitland RiverLights Festival

Dato: Sabaton, la 12-an de oktobro 2019
Tempo: 3:00-9:00 ptm
Adreso: The Levy, High Street, Maitland
La plej proksima trajnstacidomo: Maitland

Esperanto Federacio de NSK, Amikumu kaj Newcastle Esperanto Societo havos informan tablon kaj partoprenos la 'Language Lounge'.

Programo:
Modparado,
Manĝaĵbudoj,
Kuirdemonstracio,
Kulturaj muzikoj kaj dancoj,
Gustumado de lingvoj ĉe 'Language Lounge'.
Post sunsubiro:
Flosaj lanternoj,
Grandpupa teatro

Prenu: ĉapelon kaj sunkremon; puloveron
Vizitantoj: familioj, ĉirkaŭe 7000 homoj dum la evento.
Pli da informo: Andrew Spannenberg; phone 0422 015 430; aspannenberg@icloud.com




## Pica vespero ĉe Esperanto Domo



La sekva pica vespero okazos sabate la 17-an de aŭgusto je la 6a ptm ĉe Esperanto Domo.

## Sidneja Lingva Festivalo

La ĉefa evento, la Sidneja Lingva Festivalo, okazos en la Ŝtata Biblioteko de NSK sabate la 21-an de Septembro je la 12a ptm. Trevor Steele venos el Adelajdo por prezenti prelegon pri Esperanto.

LANGUAGE FESTIVAL 2019 Sydney

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00 (escepto la 4an de februaro ĝi okazos 10:00 ĝis 12:00)
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*


La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Dmitry Lushnikov |
| Estrarano: | Alan Turvey |

# amikumu

Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.

– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!

– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.
Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.
Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com
amikumu.com
www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio